



Informila sekcio en la MAGAZINO

Ion novan vi trovos sur la mezaj kvar paĝoj de la *Magazino*. Temas pri procele farita informila sekcio. Ni petas la pardonon de la negermanlingvaj legantoj pro tio, ke ĝi estas en la germana, sed ĝi estas ja ĝuste informilo por neesperantista publiko.

La projekto de regula, aŭ almenaŭ okaze aperanta germanlingva informa bulteno sub la LEA-egido bedaŭrinde ĝis nun ne maturiĝis. Mi esperas, ke tio ŝanĝiĝos. Sed mi volis jam nun iniciati unu facile aranĝeblan aferon: aperigi kadre de la *Magazino* pli-malpli pretajn germanlingvajn informilojn, elmetante ilin tiel al la espereble kritika ekzamendo de la legantoj.

Ĉi-foje temas pri re prilaborita versio de faldfolieto, kiun mi faris kun la helpo de kelkaj aliaj en novembro por disdono ĉe **Expolingua**, la lingva kaj lingvolerna foiro, kiu okazas ĉiujare en Berlino (kiel similaj ekspozicioj en multaj aliaj urboj). Konjektinte, ke al tiu aranĝo venas multaj homoj kun ioma klero pri lingvoj kaj lingvistiko, kiujn la prilingvaj informoj en aliaj informiloj ne adekvate kontent-

igos, mi celis kunmeti respondaron al la demandoj, kiuj konjekteble povas veni el tia rondo.

Mi danke agnoskas la kunlaboron de aliaj, kiuj (nevole, sen scii tion) verkis la plej grandan parton de la ĉi tie prezentita teksto: Don Harlow, kiu disvastigis tra la reto tre bonan tekston, kiu respondas al diversaj demandoj pri Esperanto. De ĝi mi senhonte plagiatis (traduke) la bazan skemon kaj multajn enhavojn. Aliajn partojn mi plagiatis de William Auld kaj el informfolio ricevita en la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, eble verkita de Herbert Meyer. Ankaŭ mi respondecas kelkajn partojn.

Laŭ mi, tiu informila sekcio povus fariĝi konstanta «metieja» rubriko, se sufiĉe da legantoj volas tion aŭ almenaŭ ne protestas, kaj se aliaj (ekzemple vi, la leganto) sin trovos pretaj prepari taŭgajn informajn tekstojn kaj disponigi ilin al la *Magazino*-legantaro por diskuto. Jen du alternativaj eblecoj:

- Vi preparu kopipretan manuskripton de via informilo sur A4-folio(j) kaj sendu tion al la redakcio por foto-

kopia aperigo. Tiu ĉi alternativo verŝajne pli konvenas al komputilantoj, kiuj plej ofte scipovas mem enpaĝigi siajn ellaboraĵojn laŭ la maniero, kiu plej plaĉas al ili.

- Vi sendu vian manuskripton al la redakcio. Mi (GM) volonte enpaĝigos ĝin komputile laŭ viaj instrukcioj. Ju pli da instrukcioj pri tio vi aldonos, des pli la rezulto kongruos kun via imago. Se vi ne aldonos instrukciojn, mi kompreneble enpaĝigos laŭ mia propra imago. Kompreneble, mi ne povas promesi trafi vian guston, kaj memoru krome, ke mi ne ĉiun programan eblon de komputila grafiko disponas, resp. scipovas apliki. Tiu ĉi alternativo eble estos la plej konvena ĉe nekomputilantoj.

Do, ni invitas al kunlaboro. Vi estas libera mem difini la alparolotan cel-

Atingi la redakcion retroŝte

Bedaŭrinde, mia provo konektiĝi al la Interreto, pasintmonate entreprenita, malsukcesis pro ĝis nun ne komprenitaj aparataj problemoj, verŝajne ligitaj kun la iom hibrida konsisto de la komputilo (origine relative malnova de la tipo 286, pli poste plibonigita per nova ĉefkarto al 486 DX 80). Do ĝis kiam tiu problemo estos solvita, mi ne estos senpere atingebla retroŝte.

Sekve, estas ankoraŭ pli facile kontakti la redakcion per la ordinara poŝto. Tamen, nia membro Sebastian Hartwig disponigis sian retadreson por kazoj de urĝeco, ŝparo de afranko aŭ simpla oportuneco. Ni vidas unu la alian sufiĉe ofte, do facile eblas aranĝi la transdonon de materialo per disketoj.

Jen la retadreso de Sebastiano:
sebastian.hartwig@rz.hu-berlin.de

GM

grupon, la teman specifon de via informilo / flugfolio kaj la konkretan enhavon, per kiu plej lerte hoki anojn de via celgrupo.

Viaj ideoj pri tio, kiel konvene distribui informilojn, estas same bonvenaj.

GM

Korekto: TANEF ne estas frakcio de SAT

Ni pardonpetas pro la dufoje aperinta malĝustajo rilate al TANEF. Bonvolu atenti la leteron de k-do F. W. Poppeck sur paĝo 10.

Apernotoj / Impressum

Eldonanto / Herausgeber:

Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj (LEAG) / Freier Esperanto-Bund für deutschsprachige Gebiete (LEAG)

Renchener Str. 47, DE-77704 Oberkirch,
(Tel.+Fax: (07802) 90 336)

LEAG per SAT en TTT:

<http://www.worldnet.net/~sat-esp/>

Redakcio / Redaktion:

Gary Mickle (G.M.), Brüsseler Str. 6,
DE-13353 Berlin, (Tel.: (030) 453 96 47),
atingebla nerekte per jena retadreso / indirekt

unter folgender Internet-Adresse erreichbar:
sebastian.hartwig@rz.hu-berlin.de

Hans Rodewig (H.R.), Stammestr. 86D,
DE-30459 Hannover

Albert Stephan (AFS), adreso de LEAG
supre indikita / oben angegebene Adresse
von LEAG

Aŭtoroj responsas mem pri siaj artikoloj; la
redakcio havas la rajton mallongigi aŭ rifuzi
alsendaĵojn.

MAGAZINO aperas kvarfoje jare / erscheint
vier Mal jährlich;

abonprezo / Bezugspreis 15,- DM

La membrokotizo entenas liveradon de la
bulteno.

LEAG-konto: Sonderkonto Kersting

n-ro 416 210-432 Postbank Essen

(BLZ 360 100 43)

Represo de materialo permesita, se la fonto
estas indikita.

La nova kapitalismo

De kiam la t.n. «reala socialismo» devis deklari sian bankroton, la nova kapitalismo de unu jaro al alia pli kaj pli montras sian veran vizaĝon. La terglabe aktivaj konzernoj nun ne plu bezonas preni en konsideron la apartaĵojn de unuopaj landoj kiel ekz. tiun specialan germanaĵon, la konstitucie ankritan kaj parte realigitan «socialan merkatan ekonomion».

La forlokigo de produktadoj en landojn kun malalta salajra kaj sociala nivelo havas ankaŭ en Germanio konatajn sekvojn: Dum la enspezmilionuloj kaj konzernoj ne pagas impostojn, dramece altiĝas por la pagantoj de la salajra imposto la socialaj kontribuoj kaj impostoj, la aĉetpovo ĉiam pli falas, dum aliflanke kreskas la nombroj de senlaboruloj. Malgraŭ giganta progreso de la produktado, la valoro de la varo «laborforto» konstante falas.


La ŝtato fariĝas pli nekapabla aĝi, ĝia potenco etendiĝas ĝis la landlimo, dum la grandaj konzernoj tamen mastrumadas en tutgloba skalo. Kiam en Tokio la borso tudas, Frankfurto malvarmumiĝas kaj Nov-Jorko malsaniĝas je gripo, kiu poste infektas la tutan Teron. La politiko

de la unuopaj ŝtatoj estas senpova kontraŭ tio. Por la finanĉkapitalo ekzistas nur unu maksimumo: profito. Ekologiaj ekkompreneoj kaj raportoj de la «Klubo de Romo» perdas valoron kaj signifon.

La nova kapitalismo, la senpova ŝtato kaj malrapide eklamanta defendobatalo de la sindikatoj kondukas al kultura disfalo. Iuj kredas povi kompensi sian timon kaj senpovecon per la fuĝo en plezuron, per feriado aŭ konsumado je pruntita mono. Aliaj al kroĉas sin al la pajlero, kiu nomiĝas: forta Eŭropo kun forta valuto. Ili esperas, ke per tio la senlaboreco estos retropuŝita. La socio dividiĝas. Solidareco estas fremda vorto kaj oni promocias ĝin nur, kiam temas pri la propra afero.

La riĉuloj frontas ĉiam pli da malriĉuloj. Eĉ la iama meza klaso (metiaj entreprenoj, detalaj vendejoj kun nur malmulte da dungitoj ktp.) iom post iom malaperas. Ĉiutage oni aŭdas la frapfrazojn: privatigo, liberaligo, tutmondigo. Sed en la praktiko tio signifas egoismon – de kiu la kondiĉoj de Norda Ameriko pozas kiel modelo.

K. H. Kersting



Kiel juna Esperanto-aktivulo en Hitler-Germanio

Walter Poppeck verkis siajn rememorojn

Ĉe unu el la lastaj kunvenoj de la Esperanto-grupo Oberkirch, Walter Poppeck prezentis sian novan eldonafon: **Kiel juna Esperanto-aktivulo en Hitler-Germanio**.

Jam en 1933 la nazioj disbatis la laboristajn Esperanto-asociojn. La t.n. «neŭtralaj» asocioj rajtis plu vegeti kelkajn jarojn. Ili penis iele-tiele travivi en la kadro de la ordonita «samdirektigo», al kiu estis submetitaj ĉiuj organizaĵoj – de la sporta klubo ĝis la filatelista klubo. Depende de la lokaj cirkonstancoj, kelkaj organizaĵoj simple ŝanĝis sian nomon kaj plu laboris «neŭtrale». Ankaŭ la laborista Esperanto-grupo, en kiu Poppeck lernis la internacian lingvon, diskrete faris tiun paŝon.

Deknaŭjara, Poppeck jam agadis kiel propagandisto. Lia agadkampo estis la regiona gazetararo, ĉe kiu li sukcesis loki mallongajn traktatojn pri Esperanto. Dum tiu tempo oni «samdirektigis» unu ĵurnalon post la alia. Iliajn «skribdirektojn», kiel oni siatempe nomis la redakciojn, oni okupis per partikamaradoj, kiuj devis konformi kun la direktivoj de la nazia partio.

En 1934 oni transdonis al Poppeck la gvidpostenon en la mez-silezia distrikto de la Germana Esperanto-Asocio, kaj en 1935 la «liga direktanto» nomumis lin «direktanto de la Ĉefa Gazetara Oficejo». En tiu funkcio li estis taskita prizorgi pere de la lokaj grupoj la gazetaron en la tuta Germanio per informoj pri Esperanto. Post kelka tempo la nazia reĝimo dekretis, ke tian «gazetaran servon» rajtu gvidi nur «skribdirektanto», kiu estas

partiano. Poppeck kiel nepartiano devis demisiĝi de sia ofico, sed rajtis plue plenumi sian laboron sub la nomo «teknika direktanto», dum partiano praktike nur laŭnome funkciis kiel «skribdirektanto». Poste oni dependigis la eldonadon de la «gazetara servo» de tio, ke la Germana Esperanto-Asocio estu registrita en la «Regna Ligo de la Germana Koresponda kaj Novaĵ-Oficejo r.a. (Berlin)», fakasocio de la Regna Gazetara Ĉambro en la Regna Kultura Ĉambro.

Por meti la «gazetaran servon» sur pli larĝan bazon, Poppeck fondis la «Tutmondan Gazetservon» kunlabore kun *Heroldo de Esperanto*, kiu aperis en Kolonjo. Ĉar socialista ĵurnalo en Nederlando aŭ Belgio aperigis la tradukon de alvoko je kunlaboro kun la plena adreso de Poppeck, ankaŭ la Gestapo ekinteresiĝis pri li. Verŝajne dank' al protokolo, de li mem verkita, kiun SS-funkciulo devis sendi al Berlino, la esplora procedo kontraŭ li estis ĉesigita du jarojn poste. Je tiu tempopunkto ĉiuj Esperanto-asocioj en Germanio estis malpermesitaj. En la originale esperantlingva libro Poppeck priskribas sian Esperanto-vivon de 1928 ĝis 1945 kiel senpera atestanto de epoko, en kiu mondaperta pensado estis maiaprobata kaj amikaj rilatoj trans la landlimojn nedezirataj kaj suspektataj.

el la *Acher-Rench-Zeitung – Mittelbadische Presse* (Oberkirch) 1998 01 29 (trad. de GM)

novajoj

Ne plu apéras *LEA-Ligilo*

La *LEA-Ligilo*, kiu celis peri informojn inter la LEA-oj de SAT kaj efektive liveris kelkajn novaĵojn, kiujn ni uzis ĉi tie, ĉesis aperi jam post kvar numeroj, ŝajne pro problemoj financi ĝin.

Nova Juna Penso aperis

Aperis en decembro de 1997 unua numero de nova serio de *Juna Penso*, organo de la Junulfako de SAT. La Junulfako reaktiviĝis post longa «dormo». Ĉi tiu numero enhavas i.a. raporton pri la helpo donita – malgraŭ la leĝa disigo de ŝtato kaj eklezioj – per ĉirkaŭvojoj de la franca ŝtato al la pasintsomeraj Tutmondaj Tagoj de la Junularo (katolika), kuirrecepton kaj artikolon pri la ekspluatado de la personaro ĉe McDonald's. La adreso de la *JP* kaj la Junulfako estas la adreso de SAT en Parizo.

PREM kaj REU disdonis

flugfolion inter parlamentanoj

Tiom da kapoj, tiom da informaj konceptoj. PREM (la rusa LEA) kaj REU (Rusia Esperantista Unio) komune publikigis flugfolion direktitan al la parlamentanoj de ĉiuj politikaj koloroj. Proponitaj por ĉiu grupo estas specife taŭgaj argumentoj, kune kun ĝeneralaj informoj pri la lingvo kaj ĝiaj avantaĝoj. Ĉar la temo «politika argumentado» ankaŭ kelkajn el ni interesas, ni dokumentas eltiraĵojn el ĉi tiu flugfolio ĉi-paĝe.

Jarkunveno de SLEA

La jarkunveno okazos 1998 04 25 en Lesjöfors. La Jarraporto por 1997 konstatas i.a. la disdonon de pli ol 1500 flugfolioj la 1an de majo, kiel ankaŭ daŭrigon de la agado ĉe svedaj EU-parlamentanoj. Pluraj SLEA-grupoj kunvenis regule.

daŭrigo sur paĝo 6

eltiraĵo el komuna flugfolio (oktobro 1997) de Rusia Esperantista Unio (REU) kaj Popola Rusia Esperanto-Movado (PREM), direktita al deputitoj de la rusa parlamento:

Ĉu vi estas «okcidentulo», subtenanto de liberaldemokratiaj valoroj kaj integriĝo de Ruslando en okcidentajn strukturojn? Sed vi ja tamen ĉe tio ne strebas al dissolviĝo de nia lando en la okcidenta mondo, sed volas, ke ĝi okupu dignan, egalrajtan lokon en la monda komunumo...

Aŭ ĉu vi estas «teritoriulo», arda patrioto kaj apoganto de memstara historia vojo de Ruslando? Sed vi jam tamen ne alstrebas izoliĝon de la lando disde la cetera mondo – sed volas, ke nia lando, ĝia lingvo kaj tradicioj ne travivu premon flanke de aliaj landoj...

Aŭ vi estas komunisto? Sed tiam vi devas senti, ke malsukcesoj de la komunista movado en la lasta-tempo estis ligitaj kun tio, ke ĝia bazo – la proleta internaciismo – ne havis sub si sufiĉan materialan fundamenton...

Ĉu vi ne estas ruso, sed baŝkiro (burjato, lezĝino, ...) kaj problemoj de la rusa kulturo por vi ne estas unuavicaĵoj? Sed tiam vin des pli maltrankviligas la problemoj de konservo de via propra gepatra lingvo, de via nacia kulturo...

Sed kiuj ajn estu viaj politikaj konceptoj, al kiu ajn nacia kaj socia grupo vi apartenas, vin, ruslandan deputiton, ne povas ne maltrankviligi la demandoj: «Kial en la mondo disvastiĝas plejparte nur unu lingvo kaj unu kulturo, forigante kaj kripligante ĉiujn aliajn, interalie la rusan?» kaj «Kiel eviti tion?»

trad. de Lena Karpunina


Novajoj: daŭrigo de paĝo 6

Esperanto-Rondo Aachen pritraktos la situacion de dependaj laboristoj en Eŭropo
Printempe de 1999 okazos denove renkontiĝo sub la prizorgado de Senlime, trilandan organizaĵo por la limregiono germana, nederlanda kaj belga. Ĝin organizas nun la Esperanto-Rondo Akeno, kiu planas pritrakti temojn de la laborvivo: graveco kaj senco de la laborejo por la homo, kondiĉoj de laboristoj nuntempe kaj estonte en Eŭropo. Planita estas vizito en industria muzeo en Stollberg.

reklamo

**LA LASTA ELIRO –
Fino de la Tempoj – Tria Jarmilo**

Detala kaj serioza studo pri la antaŭdiroj de la profetoj ekde Jesaja ĝis la nuntempaj predikantoj, inkluzive de Jesuo, la Kristo, pri la evoluado de nia planedo kaj de la ĉi tie loĝanta homaro. Mendu ĉe UEA aŭ rekte ĉe la eldonanto: SPIRITA ELDONA SOCIETO F. V. LORENZ, Caixa Postal 3133, BR-20001-970 Rio de Janeiro (Brazilo)



reklamo

Direkte Aktion enhavas en ĉiu numero Esperanto-rubrikon kun mallongaj kontribuoj pri Esperanto kaj la historio de la laborista Esperanto-movado kaj ankaŭ tekstaj eltiraĵoj kaj originalaj novajoj (devenantaj el la maldekstra/liberecana sektoro kaj suplementitaj per didaktikaj glosoj) en Esperanto.

DEN HERRSCHENDEN DIE ZÄHNE ZEIGEN

direkte aktion
anarchosyndikalistische Zeitung

Ihr bekommt uns im Abo für DM 20,- pro Jahr (6 Ausgaben) bzw. DM 25,- im Ausland. Euer erstes Heft bekommt ihr, nachdem ihr den Betrag auf unser Konto S. Werner - Konto 32 33 623 - Landesgirokasse Stuttgart (BLZ 600 501 01) überwiesen habt. Bitte euren Namen und die Anschrift deutlich lesbar angeben

Probehefte gibt es bei:
direkte aktion - c/o Dezentral
Wittelsbacher Allee 45 - 60316 Frankfurt

Esperanto en Direkte Aktion

De kelkaj jaroj la dumonata anarkisindikata ĵurnalo *Direkte Aktion*, eldonata de FAU (*Freie ArbeiterInnen-Union* – Libera Laborista Unio), aperigas regulan Esperanto-rubrikon sub la prizorgo de Will Firth. Unue ĝi enhavis simplan kurson. Nun aperas simplaj, informaj artikoloj de la tipo, kiun ni prezentas ĉi tie. Ni prezentas ĉi tie du eltiraĵojn el la rubriko, kiu aperis en la numero de 1997 11-12.



Aus einer vor zwei Jahren als „Schnupperkurs“ gedachten Esperanto-Seite war mittlerweile eine regelrechte kleine „Institution“ mit insgesamt zehn Folgen geworden. Wir sind aber der Meinung, daß die derzeit zweimonatliche Erscheinungsweise der *direkte aktion* zu selten ist, um sinnvoll einen Kurs zu bringen. Dafür gibt es ja vollständige Lehrbücher, Intensivkurse usw. Statt dessen bringen wir nun neben kurzen Beiträgen zu Esperanto und zur Geschichte der ArbeiterInnen-Esperanto-Bewegung auch Textauszüge und Originalnachrichten *auf Esperanto*.

■ Impreso pri la 6-a Renkontiĝo Oriento-Okcidento an Lvovo (Ukraino)

Laŭ mia persona opinio, malgraŭ la klopodoj¹⁾ kaj, eble, streĉa laboro²⁾ de la organizantoj, la renkontiĝon oni ne povas nomi sukcesa. Ĝin partoprenis reprezentantoj de multaj ukrainiaj urboj, kelkaj reprezentantoj el Ruslando kaj Belorusio, kvar ĉeĥoj kaj du poloj (preskaŭ lasttage devis veni unu greklandano....). Do, la reprezentateco³⁾ estis ne tre vasta, konsideranta la Okcidenton.

Tamen, gravas ne tio, sed la enhavo⁴⁾. (...) Mi partoprenis la 3-an (en Prago) kaj 4-an (en Hungario) kaj havis eblecon fari komparon. (...) Laŭ mi la organizado estis ege malaltnivela⁵⁾ – temas ne pri loĝkondiĉoj kaj manĝado⁶⁾ (tio ne ege gravis por la ĉeestintoj⁷⁾) sed la laboro mem.

D.C., esperantisto el Harkovo (Ukrainio).

1) trotz der Mühen | 2) anstrengende Arbeit | 3) etwa: das Vertreten-Sein. Will heißen: es waren nicht so viele Gruppen vertreten. | 4) der Inhalt, das Inhaltliche | 5) auf einem sehr niedrigen Niveau | 6) Unterkunft und Verpflegung | 7) die Teilnehmer

■ Liberecana Esperanto-Reto Tutmonda (LERT)

Liberecana Esperanto-Reto Tutmonda (LERT) ekaktivas de oktobro 1997 kaj estas provizore kunordigata¹⁾ de LEG (Liberecana Esperanto-Grupo) de Tuluzo. Unua stariga kunveno²⁾ de LEG okazis en katalunaj pirineoj (Iberio) la 20-an kaj 21-an de septembro 1997.

La unuaj bazoj estis pridiskutitaj kaj deciditaj jene:

1. Strebi kaj klopodi ampleksigi³⁾ la reton, traserĉante kontaktojn kun liberecanoj inter la esperantistoj kaj inverse.
2. Eldoni «Liberecana-n Informilo-n» kiu utilos/funkcios kiel ligilo⁴⁾ inter la LERT-aj kontaktoj / retanoj⁵⁾ (individuoj kaj grupoj diverstendencaj).
3. Diskonigi kaj distribui liberecanajn verkojn (librojn, broŝurojn, informilojn, ktp.).
4. Klopodi / instigi reeldonon de elĉerpitaj titoloj⁶⁾ kaj eldoni novajn verkojn originalajn aŭ tradukitajn.
5. Utiligi LERT-on kiel informservon (gazetaran agentejon⁸⁾) inter diversaj liberecanaj organizoj esperantistaj aŭ ne.
6. Alvoki ĉiujn esperanto-liberecanojn por ke ili kontaktu LERT-on por eniri ĝin kaj komenci jam aktive agadi (enkonduki esperanton en la lokajn esperanto-grupojn, sendi informojn kiuj aperos en la «Liberecana Informilo», traduki informojn de la «Liberecana Informilo» por la ne-esperanta liberecana gazetaro kaj inverse, ktp.).
7. Por financi la kostojn de la funkciado de LERT kaj de la bulteno «Liberecana Informilo» (eldonado kaj sendokostoj) estas petata al tiuj kiuj deziras ricevi ĝin minimuma sumo (30 FrF por 4 numeroj), sed krome eblas fari jarajn libervolajn mondonacojn⁷⁾. Tiujn monsumojn oni sendu al la kunordiga grupo (provizore LEG Tuluzo). Venontaj kunvenoj de LERT-aj membroj difinos pluajn interkonsentajn bazojn por ebligi efikan aktivadon de la reto.

Ĉiujn petojn kaj informojn direktu al:

Liberecana Esperanto-Reto Tutmonda, ĉe Liberecana Esperanto-Grupo, p/a CANAL SUD, 40 rue Alfred Duméril, FR-31400 TOULOUSE. Francio. Telekopiilo: +33 5 61 81 95 65, retpoŝto: canalsud@worldnet.fr

1) Netz(werk) | 2) wird zunächst von ... koordiniert | 3) Gründungstreffen | 4) ausweiten | 5) Bindeglied, Verbindung | 6) Mitglieder des Netzwerks | 7) der Nachdruck von vergriffenen Werken | 8) Presseagentur | 9) jährliche freiwillige Spenden

De la jena kontaktadreso eblas akiri pliajn informojn: FAU-Esperanto, c/o Umweltbibliothek, Schliemannstr. 22, 10437 Berlin. Ankaŭ la redakcio en Berlino povas peri kontakton (ekz. se vi havas eblecon mem entrepreni ion similan ĉe alia periodaĵo).

GM

MAGAZINO kaj dulingveco

En la lastaj numeroj de *Magazino* tiu temo ludis gravan rolon. Ankaŭ mi skribis pri ĝi kaj volas nun ripeti mian jam esprimitan opinionon. Ĝi akordiĝas kun la opinio de K. H. Kersting, ke dulingva bulteno nemulte helpas aŭ servos al nia afero.

Do laŭ mi principe *Magazino* aperu en Esperanto kaj la uzo de la germana lingvo restu absoluta escepto. Eble ni aldonu de tempo al tempo specialan germanlingvan folion varbcele. Ekzemplo estas por mi nia frat-organizo el la franclingva regiono «SAT-Amikaro». Ili agas tiel jam dum longa tempo kun sufiĉe bona sukceso.

Absolute la kontraŭon postulas k-do Hartviga, kiam li skribas pri la lingvoj uzendaj en la eldonaĵoj de LEA/G:

«...mi neniel kontraŭas fojfojan cirkuleron en Esperanto, kiu en senpretenda formo sendiĝus al la membroj por informi ilin pri la agado de la Asocio...» (*Magazino* n-ro 21, p. 3/4)

Nun ankoraŭ iomete pri la artikolo de Sebastiano Hartviga, aŭ pli bone pri la indiko, kiu troviĝas ĉe ĝia fino kaj tekstas jene:

«La aŭtoro (do k-do Hartviga) verkis ĉi tiun kontribuon originale en la germana – tute intence, pro kialoj, kiujn ĝia enhavo evidencigas, kaj ne pro mankanta scio de Esperanto. La Esperantan tradukon faris G.M.» (*Magazino* n-ro 21, p. 4)

Tiu indiko stimulis min ripete kaj tre atenteme relegi la artikolon, sed la evidencigajn kialojn por nepre germanlingva aperado mi absolute ne povis ekkoni.

Pri kio temas en tiu artikolo? Unue pri la demando, ĉu en *Magazino* aperu

artikoloj nur en Esperanto aŭ ankaŭ en germana lingvo. La dua demando estas, se ni jesas aperigi ankaŭ germanlingvajn tekstojn, ĉu tiuj ankaŭ devus aŭ rajtus havi politikajn tendencojn. Demandoj kiuj eble por niaj membroj kaj por esperantistoj estus iel gravaj aŭ interesaj, sed ĉu tio valoras ankaŭ por ne-membroj aŭ ankaŭ por ne-esperantistoj, tion mi vere ne kredas. Do kian plian utilon tiu artikolo havus, se ĝi aperus germanlingve anstataŭ esperantlingve, kaj kiaj evidencigaj kialoj tion eĉ postulus, mi ne povas vidi.

Kompreneble oni povas havi diversajn opiniojn ankaŭ pri tio kaj eble k-do Hartviga aŭ iuj aliaj gekamaradoj vidas tiujn kialojn. Estus bone, se sufiĉe da gek-do-istige de tiuj artikoloj esprimus siajn opiniojn rilate al unu- aŭ dulingva bulteno.

Friedel Bues

[Rim. de la red.: Troviĝas samtema letero de Sebastian Hartwig en ĉi tiu numero sur paĝo 10.]

En teatro oni ludas „Rikardo la Tria“. Ĉe la fama konata parolo „Ĉevalon, ĉevalon, reĝlandon por ĉevalo!“ sprita aŭskultanto krias: „Ĉu eble ne povus esti azeno?“

„Jes ja, kompreneble!“ rekras la koleriĝinta „reĝo“ Rikardo, „venu nur, mi petas, al la enirejo!“

Eta Suzanna demandis al novebakita edzino: „Ĉu vi ne estas tre laca?“

Junedzino: „Ne. Kial vi demandas tion?“

Eta Suzanna: „Ho, panjo diris hieraŭ, ke vi tre multe postkuris¹⁾ vian edzon.“

1) en la germana senco: peni por akiri la edzon.

LETEROJ AL LA REDAKCIO



skribis Sebastian Hartwig, Berlino
(1998 04 11):

En letero al la antaŭa numero de la *Magazino* mi demandis pri du aferoj:

Unue: k-do F. Bues ne volas, ke LEA en publika laboro informu pri la «ne bagatela loko [de Esperanto] en la sortimento de maldekstraj (aŭ progresivaj) strebadoj.» Kio do enestu varbilon de LEA?

Due: Kial do laŭ lia opinio necesas du apartaj Esperanto-organizoj en Germanio?

La respondo de k-do Albert Stephan al la unua demando estis:

«Principe ni ne timas prezenti al aliajn nian programon, sed deziras antaŭmalhelpi certajn miskomprenojn.»

Do prefere oni diru tute nenion, tiam ankaŭ estas nenio risko je miskompreno. Krom eble tiu miskompreno, ke la «aliaj» kredus onin morta. Kaj - detale pripensite - tio ja eĉ ne estus miskompreno.

Al la demando, kio distingas LEAn de GEA, kial do necesas du apartaj Esperanto-organizoj, s-ro Stephan respondis:

«Ni rompuz la tradicion.»

Lanti: «Tiele parolas rutinemulo. Vivu tradicion, rutino, kaj ĉia samspeca sanktaĵo.» (*Sennacieca Revuo*, 1925 07 02)

skribis F. W. Poppeck, Oberkirch
(1998 02 08) sub la titolo
TANEF ne estas «frakcio» de SAT:

En n-ro 21 (1/98) la *Magazino* jam la duan fojon malĝuste informas, ke TANEF (Turista Asocio «La Naturamikoj», Esperanto-Fako) estas «frakcio» de SAT. Jam en n-ro 18 (2/97) troviĝas tiu malvera informo, pri kiu mi siatempe atentigis la redakcion.

En la SAT-jarlibro 1997-1998 vi trovas la nomojn de la SAT-frakcioj sur la paĝoj III kaj IV. Pri TANEF vi trovas detalan informon sur la paĝoj XVIII ĝis XXI. TANEF estas fakgrupo de la Naturamika Internacio kun sidejo en Vieno. Depost jardekoj TANEF amike kunlaboras kun SAT kaj ofte aranĝas siajn jarkunvenojn en la kadro de la SAT-kongresoj, se la kongresloko estas konvena.



LA PLEJ
MALFACILA AFERO
ĈE TIU TRUDITA
KROMLABORO
ESTIS PROVI
IGNORI LA
SENLABORULAJN
VIZAĜOJN, KIU
ALPREMIS SIN AL
LA FENESTRO.

Esperanto ist doch gar keine wirkliche Sprache, oder?

Menschen verwenden Esperanto, um miteinander zu reden, bei der Liebe, beim Streit über Politik, um Gedichte (gute wie auch schlechte) zu schreiben, Romane (allegorische, sensationelle, science fiction...), um wissenschaftliche Papiere zu verfassen, am Arbeitsplatz, usw. – kurz gesagt, um mit anderen Menschen unter allen möglichen Umständen zu kommunizieren. Das dürfte schon reichen, um es als „wirkliche Sprache“ einzustufen.

Natürlich kann jemand den Begriff „wirkliche Sprache“ so geschickt definieren, daß es in diese Kategorie nicht hineinpaßt, aber das wäre die simpelste Art, es beiseitezuwischen, und kein Hinweis auf tatsächliche Mängel der Sprache.

Romantische Vorstellungen vom Wesen der Sprache prägen auch heute noch – meist unbewußt – in weiten Kreisen das Verhältnis zur Sprache: Sprache sei ein lebender Organismus, jede bewußte Einflußnahme auf ihre Entwicklung sei ein Sakrileg, zum Scheitern verurteilt und abzulehnen.

Dabei gibt es so gut wie keine Schriftsprache, die ohne planende Eingriffe auskäme. Beispiele sind das Französische, das ohne die Arbeit der Académie Française heute sicher eine andere Prägung hätte, oder das in Graubünden (Schweiz) gesprochene Rätomanisch, das bis in die achtziger Jahre unseres Jahrhunderts *keinen* einheitlichen Standard hatte, sondern aus mehreren verschrifteten Dialekten bestand. Ab 1980 wurde – an der Universität Zürich, teilweise unter Einsatz von Computern – das Rumantsch Grischun, eine Ausgleichssprache, „künstlich“ erstellt. Diese neue Schriftsprache wird sogar

offiziell anerkannt. Zwischen den genannten Einflußnahmen auf Sprache und der Ausarbeitung einer Plansprache wie Esperanto besteht kein prinzipieller, sondern nur ein gradueller Unterschied.



Hunderte neuer Bücher erscheinen jedes Jahr auf Esperanto

Ethnizistische, tief in nationalistischer Ideologie eingefärbte Vorstellungen von einem „Volkkörper“, aus dem eine „wirkliche“ Sprache unbedingt zu entstehen habe, tragen ein Übriges zur Abschätzung bei, die manche dem Esperanto entgegenbringen. Dabei sind es keineswegs nur politisch Rechtsstehende, sondern auch linke und fortschrittlich denkende Menschen – solche, die gegen plumpe Formen von

Nationalismus durchaus gefeiert sind – die in puncto Esperanto immer wieder zeigen, daß auch sie der nationalen Ideologie nur teilweise entwachsen sind. Denn sie begegnen dem Ethnischen schlechthin mit einem solchen Maß an Ehrfurcht, daß sie Kultur und Kulturvielfalt nicht anders als ethnische Kul-

tur und deren Vielfalt begreifen können, sowie sie unter der Identität eines Menschen zuallererst die ethnische/nationale verstehen. Folgerichtig sprechen sie einer nichtethnischen, nicht territorial gebundenen Sprache den Kulturwert ab – ohne sich näher mit ihr befaßt zu haben.

Aber entwickelt sich eine richtige Sprache nicht – im Gegensatz zu Esperanto?

Der Wortschatz hat sich von zunächst 800 Stämmen auf 9000 offiziell anerkannte und mindestens 9000 inoffizielle Stämme (das ist der Umfang des Esperanto-Chinesischen Wörterbuchs von Zhang Honfan) ausgeweitet. Der Gebrauch der Akkusativendung **-n** nimmt langsam zu. (Zamenhof hätte den Begriff „Schritt für Schritt“ mit **paŝo post paŝo** ausgedrückt, wohingegen die meisten heute **paŝon post paŝo** sagen.)



Die *Sennadiera Asocio Tutmonda (SAT)* ist eine weltweite Organisation links orientierter, ökologisch und gewerkschaftlich aktiver Esperanto-Sprechender

Allmählich verschwinden substantivische Stämme mit **-cio** zugunsten von abgekürzten Verbstämmen (**abolicio > aboli**, **navigacio > navigi**, **administracio > administri**, **federacio > federi**), Länderbezeichnungen mit **-ujo** zugunsten von solchen mit **-io**.

Zunehmend werden **anstataŭ** und **krom** als koordinierende Konjunktionen, statt als Präpositionen behandelt (mit daraus folgendem Gebrauch der **-n**-Endung, die eine der Eindeutigkeit dienende Wirkung hat). Die Zahl der gebräuchlichen Affixe ist gewachsen. Gehäuft haben sich auch zu Adverbien zusammengesetzte Präpositionalattribute. Es treten inzwischen Dutzende verschiedener Schreibstile auf. Als was hat das alles zu gelten, wenn nicht als Entwicklung?

Natürlich könnte argumentiert werden, daß eine Evolution der grundlegenden Struktur und Grammatik in den letzten hundert Jahren ausgeblieben ist. Das gilt aber auch für andere Sprachen.

Die oft noch verwendeten Begriffe „Hilfssprache“ und „Kunstsprache“ erwecken manchmal bei Menschen, die den tatsächlichen Umfang der praktischen Anwendung von Esperanto nicht kennen, die irrije Vorstellung einer pri-

mitiven, ausdrucksarmen Sprache, deren Gesamtbestand von der intellektuellen Leistungskraft ihres „Schöpfers“ (zutreffender ist es, Zamenhof als „Initiator“ zu bezeichnen) bestimmt ist. Den

meisten Esperantisten war schon immer bewußt, daß eine für alle kommunikativen Bedürfnisse der Menschen taugliche Sprache nur in einem kollektiven Prozeß entsteht.

Doch fehlt der technische Wortschatz im Esperanto, oder etwa nicht?

Ist es wahrscheinlich, daß eine so auf Sprache fixierte Menschengruppe die Sprache der Technik übersehen würde? Esperanto hat von den weniger gebrauchten Sprachen vermutlich einen der besten technischen Wortschatze.

Tatsächlich sind einige Musterbeispiele technischer Wörterbücher im Internet kostenlos zu bekommen, etwa Pilgers Wörterbücher der Bezeich-

nungen von Säugetieren und Insekten (nach dem Linnéschen System geordnet) oder eines der wenigstens drei EDV-Wörterbücher, und zwar bei:

ftp.stack.urc.tue.nl/pub/esperanto.

Von den EDV-Wörterbüchern ist die letzte Version des Buches von Pokrowskij mit über 1700 Definitionen empfehlenswert.

Kann man denn alle notwendigen Begriffe auf Esperanto wiedergeben?

Jede Sprache, die eine Sprecher-gemeinschaft hat, wird im Rahmen der sie bestimmenden Regeln Mittel entwickeln, um alle Begriffe auszudrücken, für die Bedarf besteht. Alle notwendigen Begriffe können heute auf Eng-

lisch, Chinesisch oder Suaheli wiedergegeben werden. Vielleicht konnte man 1887 (als das erste Esperanto-Lehrbuch veröffentlicht wurde) noch nicht alle Begriffe adäquat ausdrücken, aber in der Folgezeit wurde das möglich.

Aber große Literatur ins Esperanto übersetzen: geht das denn auch?

Eine Literatursprache ist eine, in der Werke von literarischem Wert geschrieben worden sind, ungeachtet ihrer Zahl und der Größe ihrer Leserschaft. So

weit, so einfach. Natürlich läßt sich im Einzelfall darüber streiten, ob ein Werk solchen Wert besitzt. Zu behaupten, daß eine bestimmte Sprache „literatur-

unfähig“ sei (was einige in Bezug auf Esperanto tun), ist Unsinn. Eine Sprache ist zu diesem und zu anderen Zwecken genauso fähig wie ihre Benutzer, ohne die sie zu nichts imstande wäre, weil sie dann gar nicht existieren würde.

Esperanto war von Anfang an eine Literatursprache. Unter den Beispieltextrn des „ersten Buches“, mit dem Dr. L. L. Zamenhof sein Sprachprojekt 1887 der Öffentlichkeit vorstellte, waren zwei originale Gedichte des Verfassers und ein übersetztes von Heine. 1894 erschien die Übersetzung von Shakespeares *Hamlet*. In der Überzeugung, daß der praktische Nachweis der Eignung von Esperanto für literarische Zwecke mehr zählt als alle theoretischen Überlegungen, übersetzte Zamenhof danach eine beachtliche Zahl von Werken von Goethe, Schiller, Molière, Gogol, Orzeszkowa, Andersen u.a. Er übersetzte das Alte Testament und schuf eine umfangreiche Sprichwörter-sammlung.

Andere Esperantisten folgten seinem Beispiel. Die Herausforderung, die das Übersetzen sowohl an den Übersetzer wie an die Sprache stellte, brachte einen enormen Gewinn an Ausdrucksfähigkeit, nicht zuletzt durch das rasche Anwachsen des Wortschatzes. Esperanto ist eben nicht die Erfindung eines Einzelnen, sondern – wie jede Sprache – eine kollektive Schöpfung.

Inzwischen schätzt man die ins Esperanto übersetzten Werke auf mindestens 10 000 – Romane, Kurzgeschichten, Lieder, Gedichte, Anthologien, natürlich auch nichtbelletristische Werke jeder Art. Sie stammen aus den unterschiedlichsten Ländern und Kulturkreisen. oft gerade aus den „kleinen“ Sprachen und Kulturen.

Die Originalliteratur des Esperanto ist als die einzige übernationale Literatur bezeichnet worden. Sie umfaßt ebenfalls alle Literaturgattungen, wobei die Lyrik einen großen Platz einnimmt, auch die Kurzgeschichte. Das Drama ist dagegen weniger erfolgreich, was angesichts der Streuung der Sprachgemeinschaft über viele Länder nicht verwunderlich ist.

Es gibt sowohl gute Übersetzungen großer Literaturwerke ins Esperanto – dasselbe gilt für Originalwerke – wie auch schlechte. Für jede Sprache gilt, daß eine einzige gute Übersetzung oder ein ebensolches Originalwerk ausreicht, um die Qualitäten der Sprache unter Beweis zu stellen.

Die Literatur des Esperanto wächst jede Woche um einige Titel. 1993 hat der Kongreß der Schriftstellervereinigung PEN das Esperanto-PEN-Zentrum (der esperantosprachigen Schriftsteller) als Mitgliedsverband und somit Esperanto indirekt als Literatursprache anerkannt.

weitere Information (auch zu Kursen und Lernmöglichkeiten):

- Freier Esperanto-Bund für deutschsprachige Gebiete (LEA/G; mit SAT verbunden): Renchener Str. 47, DE-77704 Oberkirch. Tel.: (07802) 90 336
- Deutscher Esperanto-Bund (allgemeiner Esperanto-Verband in Deutschland), Immentalstr. 3, DE-79104 Freiburg, Tel.: (0761) 28 92 99
- Maldekstra Forumo Berlino („Linkes Forum“), p/a G. Mickle, Brüsseler Str. 6, DE-13353 Berlin. Tel.: (030) 453 96 47
- Esperanto-Centro Berlin (Info. zu Kursen u. Aktivitäten in / um Berlin), Falkstr. 25, DE-12053 Berlin. Tel.: (030) 687 31 30
- Esperanto in Deutschland (Web-Seite): <http://www.esperanto.de>

[V.i.S.d.P.: Gary Mickle]

Esperanto: neetna, senteritoria, senkultura?

de Gary Mickle

La ideologio de naciismo/etneco kaj la sinteno al Esperanto

«Etno orientitaj, profunde en naciisma ideologio tinkturitaj imagoj pri 'popolkorpo', el kiu 'vera' lingvo nepre devas estiĝi, kontribuas plian porcion al la malaprezo, per kiu iuj homoj rilatas al Esperanto. Lige kun tio, neniel estas nur politike dekstre starantaj homoj, sed ankaŭ maldekstre kaj progresive pensantaj – homoj kun efektiva imuneco kontraŭ plumpaj formoj de naciismo – kiuj koncerne Esperanton ĉiam denove montras, ke ankaŭ ili nur parte disiĝis de la nacia ideologio. Ĉar ili renkontas la kategorion mem de etneco per tia grado de adorado, ke ili ne kapablas koncepti la kulturon kaj la kulturen diversecon alie ol kiel etnajn kulturojn kaj ilian diversecon, same kiel ili komprenas unuavice la etnan/nacian identecon kiel la tutan identecon de homo. Tute konsekvence estas, ke ili forneas la kulturen valoron de neetna, ne teritorie ligita lingvo – sen antaŭe konatiĝi kun ĝi de proksime.»

Jen la Esperanta traduko de alineo el la flugfolia suplemento de ĉi tiu numero – la internaj kvar paĝoj. Eble vi, la leganto, jam vidis ĝin kaj miris trovi tiel «politikecajn» eldirojn en informilo, kies temkomplekso estas propre *lingvistika*. Kaj eble tiu kunkirlaĵo de du ne unuavide parencaj temoj ne plaĉas al ĉiu en la unua momento. Verŝajne mi ne povos tiri la subtenantojn de politike «neŭtrala» informado al mia vidpunkto, sed mi esperas almenaŭ ilustrati, kiel intime la politiko povas kuntuŝiĝi kun la temo

– ne evidente politika – «Esperanto kiel lingvo kaj lingvaj antaŭjuĝoj kontraŭ ĝi».

Esperanto, etneco, teritorieco: pritakso el la Germanio de 1936

Esperanto und Volapük überflüssig

Nur die natürliche Sprache kann Mittern von Volk zu Volk sein.

Nachdem der Stellvertreter des Führers es bereits den Angehörigen der verschiedenen Parteigliederungen unterlagt hatte, einer Kunstsprachenvereinigung anzugehören, hat jedoch auch der Reichsleiter des

Esperanto kaj Volapuko superfluaĵ

Nur la natura lingvo povas esti peranto de popolo al popolo

Post kiam la Deputito de la Gvidanto jam malpermesis al la diversaj partiaj subsekcioj la apartenon al asocioj por artefaritaj lingvoj, nun ankaŭ la regna gvidanto de la Ligo de Germanaj Ŝtataj Oficistoj jus esprimis la atendon, ke ankaŭ la germanaj ŝtataj oficistoj sin tenos for de tiaj asocioj.

Tiu alpreno de starpunkto ne povas mirigi iun ajn, kiu familiariĝis kun la esenca fundamento de la nacisocialismo. Mondrigardo, kiu metis la bonon de la nacio en la antaŭan rangon de ĉiuj siaj strebadoj kaj instruas la memkomprenoblan estimon al aliaj nacioj, havas ĉian respekton al vivaj, kreskintaj, teritorie bazitaj lingvoj, sed rigardas artan lingvon kiel Esperanton, Idon aŭ Volapukon kiel plene superfluan, ja eĉ kiel malutilan.

Prave! Ja ankaŭ neniam okupiĝis pri Esperanto kaj similaĵoj homo, kiu havis eĉ nur nocieton pri la naturo de lingvo. La inventinton de Esperanto gvidis siatempe la deziro inventi idiomon, kiun egale facile povus lerni la anoj de la plej diversaj nacioj. De tio li atendis ion favoran al la alproksimiĝo de popoloj, al la eterna paco. Hodiaŭ oni apenaŭ plu devas detale elmontri, el kio konsistis la profunda miskompreno en tia celdifino. La popoloj ne interproksimiĝas, kiam ili utiligas artefaritan idiomon, sed proksimiĝas nur, kiam ili ekkonas kaj ekkomprenas sin reciproke en sia specialeco kaj siaj naciaj apartaĵoj. Sed al tio apartenas la memkomprenebla premiso, ke oni klopodu lerni la lingvon de la najbaro. Kiu volas kompreni Francion aŭ Anglion, tiu devas jam iomete okupiĝi pri la angla kaj la franca; li devas almenaŭ ekkoni la literaturon de tiuj popoloj per bonaj tradukoj. Tiunmaniere la gepatra lingvo povas iĝi pli bona interpretisto por la fremda specialeco ol artefarita lingvo.

Ĉiuj ĉi artefaritaj lingvoj ja ankaŭ neniam trovis grandan disvastiĝon. Certe ekzistas granda nombro da Esperanto-asocioj en Eŭropo, sed ilia aktiveco estas asocia hobiismo sen ia ajn praktika aŭ ideala valoro. Por la eŭropa interproksimiĝo ili eĉ minimumon ne efikis kaj ja ankau tute ne kapablis tion. Ne nur en Germanio, sed ankaŭ eksterlande tiuj artefaritaj lingvoj troviĝas en rimarkinda regreso. Ili verŝajne unu tagon trafos en plenan forgesitecon kaj neniu ploros larmon pro ilia paso.

Ekzistas abundo de okazoj por ĉiu, kiu volas okupiĝi pri fremdaj lingvoj. Kiu entute havas talenton je tio, al tiu la angla aŭ franca certe ne prezentos multe pli da malfacilaĵoj ol Esperanto aŭ Volapuko. Sed li rikoltos senegale pli multe pro sia penado kaj sia diligenteco.

Iam ekzistis monda lingvo, kiun komprenis ĉiuj kleruloj. Tio estis la latino en la mezepoko kaj en la epoko de la humanismo. La latina estis tamen neniel morta lingvo, sed vere internacia rimedo de interkompreniĝo, kies lokon poste okupis la franca lingvo ĝis profunde en la dekoka jarcento, kvankam en pli malforta grado. Hodiaŭ ne plu ekzistas tia monda lingvo, sed kompensas tion la fakto, ke la kono de fremdaj lingvoj estas ĝenerale pli disvastigita ol en pli fruaj epokoj.

Heinz Felandt

ĉerpita el la *Neusser Zeitung* de 1936 junio

Esperanto, etneco, teritorieco: pritaksoj el la nuntempa Francio

«1) Respondo de Lionel Jospin (jospen), socialisto – nuna ĉefministro – tiam kandidato al prezidenteco de Francio, la 14-an de aprilo 1995, al Jean Paul Colnot (janpol kolno), vicprezidanto de 'Esperanto France-Est'

'[...] La Esperanto-instruado ne povas okazi malprofite al tiu de la lingvoj oficiale agnoskitaj kaj parolataj en la diversaj ŝtatoj de la mondo.

Estus ankaŭ neoportune devigi la uzadon de Esperanto por la interŝtataj rilatoj ĉar kvankam tiu lingvo respektas ĉies lingvon kaj kulturon, ĝi neniel posedas kulturalan tradicion kaj ne konsistigas la kromajon de geografie difinitaj kulturaj aktivecoj.'

[...]

2) Eltirajo el la dokumentoj de la Nacia Asembleo, responde al Claude Gaillard (klod gajar'), deputito el departemento Meurthe et Moselle (mert e mozell)

'[...] la franca eduka sistemo estas unu el tiuj, kiuj, en Eŭropo, kaj la cetera mondo, proponas al la familio la plej

vastan elekton. Pro tio ŝajnas neoportune ankoraŭ pliigi la diversecon. Pro manko de beletra, historia kaj geografia heredaĵo kompareblaj al tiuj de klasika aŭ landopropra lingvo, Esperanto ne povis enviciĝi inter la lingvoj proponataj en ekzamenoj. [...]

Temas pri ŝablona respondo uzata de la sinsekvaj francaj ministroj pri nacia edukado – ĉu dekstraj, aŭ maldekstraj. Varias nur la nombro de proponataj fremdaj lingvoj.»

ĉerpita el letero de **Lucien Bourgois** (Francio) aperinta en *Debreceña Bulteno* n-ro 103 (1997 11), p. 4-5.

S-ano Bourgois tiel komentas la citaĵojn en la sama letero: «La akcepton de universala – mi diru 'internacia' – helpolingvo tute ne lingvistikaj kialoj baras.»

Preskaŭ universala dogmo

Mi kredas, ke ĉi tiuj citaĵoj bone ekzempligas la kontinuecon de certa etnoorientita penstradicio rilata al Esperanto, kiu apriorie neas la valoron de kulturaĵo evidente ne ligita kun iu etno aŭ geografia teritorio. Estus facilege, sed ankaŭ facilanime, diri: *Kia simileco ĉe la burĝaj ideologoj! Jen nazio kaj socialdemokrato negative pritaksas demokratian reformproponon per preskaŭ identaj vortoj. Interese, interese.* Sed tio estus simplaĉa polemiko. La vero estas pli komplika.

Unue, la germana ĵurnalisto de 1936 ne ŝajnas esti vera nazio. Rimarkinde, li evitis eltroigi la certe al li konatan, tiu-epoke mortklaban argumenton pri la «judeco» de la Esperanta afero kaj ĝia iniciatinto. Li ŝajne konformiĝas al la postuloj, kiuj trafas lin de supre, kiel salajruloj ankaŭ 62 jarojn poste devas fari.

Due, la falsa egaligo *kulturo = etna kulturo* kaj ĝia korolario *neetna = sen-*

kultura, estas preskaŭ universale kredata dogmo en la burĝa-kapitalisma epoko, kaj ne specialaĵo de «burĝaj ideologoj». Ankaŭ Lenin laŭ kredindaj raportoj esprimis sin pri Esperanto simile kiel la supre cititoj, kaj se vi ne ŝatas Lenin, eblus verŝajne trovi iun de vi aprezatan famulon, kiu diris ion kompareblan.

Trie, kaj plej interese ĉi tie, la esperantistoj mem en kelkaj cirkonstancoj montras sin adeptoj de la la sama subkuŝanta ideologio: adorado de etnoj kaj etneco en la plej larĝa senco, kiu elstarigas kiom eble la rolon de etno/nacio, traktante tiun kiel la ĉefan komponanton de la individua identeco, kiel ĉefan kulturgeneran faktoron. Mi ne parolos ĉi tie pri la afineco inter multaj esperantistoj kaj la etnismo, kio estas temo por si, kiu meritas detalan pristudon. Sed kion diri pri la ofta en Esperantujo klukado pri «koka-kola-imperiismo» kaj simile? Per kiuj argumentoj oni atakas la dominantan formon de kosmopolita kulturo en la nuna epoko? Ja ne pro ĝia karaktero kiel produkto de kapitalismaj konzernoj. Ataki la kapitalismon eksmodiĝis jam en la okdekaj jaroj! Ankaŭ ne pro ĝia karakteriza usoneco. Oni ja ne malŝatas Usonon kaj usonanojn! Ankaŭ ne ĉar ĝi uzas la anglan anstataŭ Esperanto. Ni ja ne estas drolaj sektuloj, kiuj alparolas popkantistojn kun la peto, ke ili forjetu la anglan kaj kantu Esperante. Kia estas la tipa objekto? Ĝi okazas ĝuste pro la kosmopoliteco mem, kiu faras tian mondkulturon en la okuloj de multaj malpli «aŭtentika» ol la etnaj, teritorie ligitaj kulturoj.

Kial do miri, ke la minoritatan kosmopolitecon de la marko Esperanto aliaj foje atakas per argumentoj, kies idea fono estas la sama?

Pripensoj pri la danĝeraj kategorioj de nacieco kaj etneco

Eŭropo sen limoj?

de Peter F. N. Hörz (el *Neues Deutschland* 1997 09 13-14 / tradukita de GM)

Pli kaj pli evidentiĝas, ke naciaj registaroj rapide perdas sian liberan agadradiuson. Kun certa senhelpeco la politiko devas rekoni, ke ĝi jam povas nur postlami per siaj agadoj la realajn evoluojn ekitajn de la mondscale funkcianta industrio... Estas ironio de la historio: Dum la iamaj standardoportantoj de la internaciismo – la laborista movado kaj kaj socialdemokratiaj partioj – foje esprimas sin favore al la meto de novaj limoj cele al ŝirmado de la propra klientaro, la stirantoj de la grandaj konzernoj montras sin la «uloj sen patrio» de la nuna epoko.

La ekonomia evoluo supervenkis la dividantan efikon de landlimaj linioj kaj estiĝis inter homoj, kiuj vivas milojn da kilometroj for unu de la alia, senperan rilaton: ekzemple ĝi metis la azian laboriston en rektan konkurencon kun la germana. Kiu volus nomi riproĉindan tion, ke la koncernuloj sopiras la landlimojn kaj doganajn barierojn?

Ne tute malprave oni diagnozas nuntempe la internaciigon de la kulturproduktoj, la mondan disvastiĝon de markoj, komunikiloj kaj kondukmodeloj, kiel ankaŭ la el tio rezultantan renesancon de la mikrokosmoj. Ĉe zenito de perkommunikila apertigo kaj fronte al neniam spertita oferto de vetureblecoj, la banala kaj centfoje kiel reakcia senmaskigita «hejmlando», kiel ajn en ĉiu unuopa kazo difinita, prezentas por multaj allogan oferton de subjektiva ŝirmiteco. La afero estas – kaj en tio konservativaj rondoj sin trovas en malofta

akordo kun diversaj maldekstraj-alternativaj kulturkritikantoj – meti limojn. Limojn inter la «malbona» ekstera mondo kaj la idilio de la malgranda regiono. Limojn kontraŭ «forvendo de la kulturo de la ĉiutageco» kontraŭ rapidmanĝejoj el Usono, ĉielskrapuloj en la «organike kreskinta» urba tutajoj kaj la konverto de malnovaj kamparaj gastejoj en picejojn aŭ de antaŭurbaj drinkejoj en ĉinajn restoraciojn. Antaŭ la fono de tia kulturbatalo la cidrotrinkado en Ŝvabio iĝas regionpatriotisma devo, la superfermentita blankbiero iĝas aŭtenta bavara kemia armilo kontraŭ la samniveleganta Coca-Cola-imperiismo.

En la scienco, la lokon de la socia interdiskurso de pasintaj jaroj okupis la tezo pri la «neakordiĝeblo de la kulturoj». Kun la turniĝo al konservativismo, etne kaj biologie orientitaj mondinterpretaj modeloj gajnis signifon. Ĝuste la kulturajn diferencojn oni lastatempe denove invokas por klarigi sociajn malegalecojn. Ili legitimu la dividliniojn inter la riĉaj kaj malriĉaj popoloj, inter prosperaj enlandanoj kaj senrimedaj enmigrintoj. La kultura alieco, kiun ni aplaudas ĉe pitoreskaj folkloraj prezentaĵoj, iĝas en la ĉiutaga vivo, de akriĝintaj disdividbataloj karakterizita, argumento favora al materiale kondiĉitaj homekskludaj strategioj. «Kulturo kaj tero» tekstas la formulo, per kiu ostracismi la konfliktojn de la nuntempo.

La sekvoj de la tutmonda forigo de limoj estas la renesanco de la triboj, kaj la kulturantropologia skolo de la

postfolklorika¹ esplorado atribuas altan signifon al la sinnenferma bezono ĉe homoj, rigardas la metadon de limoj kiel biologie determinitan bazan leĝon de la homa ekzisto. Malbona aŭguro por la procezo de integriĝo kaj, laŭ reduktita rigardmaniero, blanketo por (intelektaj) krimbruligistoj. Ĉar: se estas laŭ nia naturo reagi al fremduloj per agresado, tiam ni neniam kulpas pro tio!

La pli socikritikaj heredantoj de la folkloriko metas la hodiaŭ ankoraŭ efikan signifon de la limomarkado en alian rilaton: La senpera dependeco de la agro kaj paŝtejo – laŭ la centra tezo – faris la limŝtonon ĉeffaktoro de sekurigo de la kolektiva travivo en, profunde malstabila ekonomia procezo.

Tamen, la bezono de nuntempuloj marki limojn estas per tio ankoraŭ ne sufiĉe klarigita. Kio mankas, estas la aspekto de etneco, kiu komencis sian karieron nur dum la estiĝa procezo de la teritoria ŝtato. Estas la sento de nacia kunaparteno, kiu sekurigas la koheradon de la teritoriaj unuoj, kiuj estiĝis en la 15a kaj 16a jarcento. Estas la abstrakta sento de ni-eco, kiun Georg Simmel nomis la «psikaj fortoj», kiuj la loĝantojn de difinita teritorio «el dominanta centra punkto politike kuntenas». Nur kiam tiu komunajogenera konscio estiĝis, ĝi kondiĉis la aperon de la antagonismoj inter najbaraj socioj kaj kaj metis landlimojn sub alian lumon: kristaliĝis ĉi tie tio, kio la nacion «en la pleja interno kuntenas». Ambaŭflanke de la imagita linio, kiu dividas la spacon en cison kaj transon, la substrato de tio, kio formas la naciojn, aparte klare manifestiĝas.

Alie ol en la teritoriaj nacioj, ekz. Francio aŭ Anglio, la setloteritorioj de la

¹ folkloriko: tiel mi tradukas la germanan nocion *Volkskunde*

sin germana difinanta loĝantaro estis en la historio neniam identa kun la samepoka politika teritorio de Germanio. Stato de aferoj, kiu helpis al la ideo de etneco travivi apikan kaj je la fino ekstreme fatalan karieron...

Ĝis la mezo de la jarcento la koncepto de etne bazita nacia ŝtato havis por la ekzisto de la landlimoj sencodonan efikon. Post la fino de la dua mondmilito, unu rezulto de kiu estis nova, murda landlimo, la pensado en etnaj kaj naciaj kategorioj tamen ŝajnis pasintaĵo: Estis anoj de la generacio de hodiaŭaj pliaĝaj ŝtatistoj, kiuj en la kvindekaj jaroj manifestaciis ĉe limtransirejoj por senlandlima Eŭropo. La Traktatoj de Romo kaj la Eŭropa Komunumo por Karbo kaj Ŝtalo estis vojmontriloj al unuiginta Eŭropo, kies idealimagon larĝa plimulto en la socio portis en si kiel sekvo de la historiaj spertoj.

Ke tiu eŭropa ideo fine senkrediĝis, okazis plej unuavice pro sensencaj politikaj akrobataĵoj pri la difino de pomoj, la normoj de bananoj, kiel ankaŭ la agrikultura problemaro. La publika diskuto pri superflua eŭrokratoj, hipertrofiataj administraciaj aparatoj kaj fabelecaj salajroj por bruselaj EU-purigistinoj havis plian efikon.

La «komuna domo» konsistas ĝis nun el asociiĝo de ĉiam ankoraŭ forte etnecacie difinitaj teritoriaj regadunuoj, kiu ĉiam iomete memorigas pri la diseriĝinta Sovetunio kaj la krevinta Juĝoslavio. Fakte, oni ne povas kompari tiujn politikaj sistemojn kun la strukturoj en la EU, sed komuna al ili ĉiuj estas, ke ili lokis la kategorion de etneco en la fono favore al «pli alta ideo». Kaj kiel montras la historio: Ju malpli tiuj ideoj ankris en la kolektiva konscio, des pli fortiĝis la orientiĝo je etnaj gvidmotivoj. Ke en la poststalinismaj ŝtatoj la naciismo disfloras, ke oni okazigas

pogromojn kaj kreas novajn limojn, fontas unuavice el tio, ke la iam koherodona «pli alta ideo» ofte montriĝis esti varma aero en la praktiko.

Sed kio fariĝos el Eŭropo, se la alta idealo de unuiĝo iam same ŝajnos aeraĵo al larĝa loĝantara bazo en la ŝtatoj-membroj?

Estas ĝuste, ke – kiel Helmut Schmidt skribis en Malferma Letero al Hans Tietmeyer, prezidanto de la Federacia Banko (*Die Zeit*, 1996 novembro 8) – la ekonomiaj kondiĉoj en la germanaj ŝtatoj de la jaro 1875 estis tiel diversaj kiel la aktualaj en Eŭropo. La ĉiodecida diferenco tamen konsistas en tio, ke komuna valuto en la ĝis tiam de etŝtatismo karakterizita etna nacio Germanio signifis politikan paŝon en la direkto al la interkonsente alstrebata nacia unueco. La prusajn kaj hadenajn klerajn burĝojn unuiĝis siatempe la imago de etna-nacia komuneco. La holstinian kaj andaluzian laboriston, kontraste, unuigas hodiaŭ apenaŭ io pli ol la zorgo pri la laborloko – pri kiu ambaŭ supozas, ke ĝi estas retenebla nur en batalo unu kontraŭ la alia. Kaj tio estas atribuebla ne nur al la perdo de socialismaj utopioj, sed unuavice al fatala deficitado en la eŭropa politiko de la pasinta jardeko unuflanke, kaj al la refortiĝo de nacia kaj etna pensado aliflanke.

Jam nun la socie premataj homoj en la EU iras sur la straton pro la eŭrovaluto, dum la plibonstatuloj vojaĝas al Svisio kun valizetoj. Al unu tro limiga, al la alia tro malmulte stabilecorientita ŝajnas la eŭropa financpolitiko en la antaŭojlo de la valutunuiĝo. Kaj tiu intereso-kontraŭdiro ekzistas ne nur inter la sociaj supro kaj malsupro en Germanio (kiu estus politike regulebla, se oni nur volus), sed inter la ŝtatoj kaj popoloj – kio ŝajnas prekara, ĉar ĝi metas la

Eŭropo-politikon en kontraŭdiron al naciaj intereso.

La eksa kanceliero en sia kredkonfeso favore al la eŭroo prave eldiris, ke Germanio ne faru sin neŝatata en kunliĝo kun la financpolitiko. Neniel estiĝu ĉe niaj najbaroj la impresoj, ke en Germanio dominemo laŭ la stilo de la vilhelma epoko akiras pozicion, aŭ ke gvidanteco en la Unio estas alstrebata. Sed kio okazos, se ŝajnos al nur parto de la pri sia ŝparitaĵo timanta germana meza tavolo tiel, kvazaŭ oni pro konsideroj de la Eŭropo-politiko fordiboĉis ilian por-krizan ŝparadon?

Jam hodiaŭ la aŭstra dekstra populisto Haider ludas kun la prognozo, ke lia lando perdos laborpostenojn pro la valutunio. Oni povas interpreti tion kiel panikismon de la kutima tipo. Sed se post enkonduko de la valutunio – pro kiu ajn kialo – efektive perdiĝos laborpostenoj, oni povas bone bildigi al si la hurladon de Haider, Bossi, Le Pen kaj similuloj.

Sojle de la unuigita valutozono venĝas sin, ke la nova Eŭropo ofertas neniam aŭ tro malmulte da alcentrige efikantaj faktoroj de sencodonado. Post la fino de la «grandaj» utopioj restas por multaj evidente ne plu pli ol la postulo pri novaj limometoj. De la landlimo-malfermoj en la sekvo de la Kontrakto de Schengen, de la interna merkato profitis ĝis nun nur la produktiva sektoro kaj la krimagado – kiuj ĉiukaze estas jam delonge internaciigitaj. Se la «malgranda homo» ĉe tio perdas sian subjektivan sekuresenton.

En la daŭro de historia procezo ni lernis respekti limojn, kiuj firmigas la rilatojn de posedanteco je terparceloj kaj la sur ili perlaboritaj produktoj. Ni lernis lasi integraj la dislimajn liniojn inter la etne determinitaj nacioj, kaj ni spertis, ke ni povas atingi prosperon ene

de tiuj limoj. Elimini tiujn limojn nun – kaj ankaŭ la unuecigo de valutoj estas forigo de limo – vekas timon kaj necese ekscitas rezistemon. Precipe en la grupoj de la loĝantaro, kies socia statuso ĉiukaze ŝajnas nestabila.

Generacioj formariĝis al murdozaj militejoj pro landlimoj. Ke la landlimoj en la kapoj ne povas sur la fono de la aktualaj politikaj procezoj simple malaperi, ne povas miriĝi. La mallongtempa perspektivo de la politikistoj, kiuj momente sin montras en sia tuteco «eŭro-afablaj», lasas ekster konsideron, ke la teniĝo de la loĝantaro koncerne la EU povas rapide ŝanĝiĝi, kaj ke pro tio ankaŭ aliaj personaj-programaj konfiguroj povus rezulti ĉe estontaj EU-pintkonferencoj. Amikeco inter Kohl kaj Mitterrand resp. Chirac ankoraŭ ne estas garantianto de longdaŭraj stabilaj, amikecaj rilatoj inter la germana kaj franca popoloj. La supervenko de nacia pensado postulas pli ol kontraktitaj komunaj, ŝtataj vizitoj kaj – ni pensu pri la rilatoj kun la Rusio de Boris Jelcin – kolektiva saŭnoŝvitado sur la plej alta nivelo.

Antaŭ tiu fono la demando pri la psika remburado de la spaco, kiu iĝu la Eŭropo de la estonteco, estas pli kaj pli grava. La altgrade internaciigitaj etnaciaj pensmodeloj kaj la enkapo metado de limoj povas esti venkitaj nur, se pri la alcentrige efikantaj animaj enhavoj ene de la kreata nova teritorio ekzistas vasta interkonsento. Sed kiel entute nomiĝu tiuj interkonsentokreaj enhavoj? Tiurilate ni suferas sub giganta deficitado!

La en la historia procezo lernitaj kategorioj de nacieco kaj etneco konsistigas ankaŭ hodiaŭ (aŭ jam denove) por multaj allogan oferton. Ili helpas interpreti infrastrukturan, ekonomiajn malfacilaĵojn kiel sekvojn de fremdula regado kaj fortunaj atenton de efektivaj kaŭzoj.

La politiko, forŝvebinta de la popola pensado, nur tro ofte ignoras tiajn tendencojn. Sed jam unufoje situis je la fino de retorikaj, kiuj trouzis la laŭdiran diktadon de fremduloj kaj atribuis la socialan mizeron de la vastaj popolamasoj al la Traktato de Versailles, hororiga senlimiĝo...

Internacia Ferio-Semajno de TANEF

en la naturamika domo «Krikenhaar»
Nederlando (20a de junio ĝis 27a de junio
1998)

«Krikenhaar» situas en la provinco Overijssel apud la vilaĝo Bornerbroek en la bela regiono «Twente». La domo estas elirpunkto por multaj promenetoj kaj biciklado. En la tuja apudeco troviĝas la urboj Almelo, Borne, Hengelo, Enschede kaj Oldenzaal. Enschede estas nur kelkajn kilometrojn for de la germana landlimo. Dum tiu semajno okazos ankaŭ la TANEF-jarkunveno.


La programo ampleksas krom la jarkunveno de TANEF: unu tutagan ekskurson, rondveturadon tra la regiono Twente kun «Twente»-lunĉo (regiona manĝaĵo), prelegojn kun lumbildoj, kantadon kaj muzikon de la NIVON kantkaj muzikgrupo el Almelo, promenadon kaj muzeo-viziton. Se pluraj el vi dezirus tion, ni povas okazigi matene Esperantan lingvokurson aŭ konversacian lecionon.

Restado, plenpensiono kaj ekskursoj: 550 guldonoj, 575 gld. post la 98 04 30. Por nemembroj 50 gld. pli.

Informojn kaj aliĝilon petu de: Abel Lingbeek, Fogelsanghstate 4, NL-7608 HJ Almelo.

reklamo

JUS APERIS CE SAT : VUALO DE L'SILENTO



Juna kabilino Ĝura estas mortkon-damnita de sia familio, ĉar ŝi trans-paŝis la praaĵn regulojn kaj elektis vivkunulon francon kaj generis kun li infanon.

Tio okazas en Parizo, en 1987, kaj la viktimo de tiu "punekspedicio" estas la aŭtorino mem de tiu libro.

En "Vualo de l'silento" ŝi ne nur rakontas tiun dramon. Ŝi ankaŭ kun-prenas sin en la magion de la kabila montaro, priskribas la tragikan folk-loron de la helpdomaroj por gastla-boristoj, kaj vipas sen ia ajn politika antaŭjuĝo la nekredeble arkaismajn vivkondiĉojn de iuj islamaj virinoj en la nuntempa Eŭropo. "La vualo", kiun la aŭtorino levas ĉi tie, najbaras al seriozega aktualaĵo, kiu ne estas limigita - tion oni vidos sur tiuj paĝoj

- nur al la surmeto de speciala kaptuko.

Travivita romano. subskribita per sango kaj de kiu oni eliĝas konsternita, alipen-santa. admiranta kaj informita.

*Formato : 15,50 x 23,50 cm. 168 paĝoj. Koloraj kovrilpaĝoj.
Prezo : 70 FRF + afranko. Mendebla ĉe SAT, 67 av.
Gambetta, FR-75020 Paris aŭ ĉe via libroservo.*

"Ni scias, ke la tero estas globforma", diras la instruistino. "kaj konstante turniĝas. Kiu scias, ĉirkaŭ kio ĝi turniĝas?"

Tuj la malgranda Petro levas la manon kaj respondas: "Ĉirkaŭ la Dolaro, sinjorino!"

"Mi intencas skribi al la rompoŝtelisto. kiu pri-rabis mian loĝejon."

"Ĉu vi kredas, ke vi tiel ricevos la ŝtalojn?"

"Ne, sed tiu ulo rakontu al mi, kiel li sukcesis penetri en la loĝejon ne vekante mian edzinon."

solvo de la krucvortenigmo
en *Magazino 21*

S	E	R	P	E	N	T	O		U
A	N	A		K		I	N	O	J
L	I		H	A	L	O	O		O
U	R	O		R			M		
B	I	O		T	I	P	A	R	O
R		M	U	O			S	E	D
E	L	O			K		T		I
C		T	E	R	A	P	I	I	S
O	D	O		E	D	U	K		E
	E		K	A	M	I	O	N	O

reklamo

Rudolf Burmeister

Zur Geschichte des Deutschen Arbeiter-Esperantisten- Bundes

Bezirk Erzgebirge-Vogtland

(Chemnitz / Plauen i.V.)



Daten - Fakten - Dokumente

reklamo

germanlingvaj broŝuroj de

Maldekstra Forumo

info-serie

- Was ist Esperanto? Wozu Esperanto? n-ro 1
- Eine andere Kommunikationsidee: Esperanto. n-ro 2

Esperanto und das internationale Sprachproblem

- Wojciech Usakiewicz: Esperantistische Weltbilder. n-ro 1
- Gaston Waringhien: Lazarus Ludwig Zamenhof / L. L. Zamenhof: Brief über die Entstehung des Esperanto. n-ro 2

Flugfolioj

Maldekstra Forumo eldonis kelkajn flugfoliojn por disdonado ĉe manifestacioj, ĉe standoj ktp. Laŭpete ni sendos al interesitoj specimenojn (de ankoraŭ disponeblaj) flugfolioj.

Prezoj

- Broŝuroj de la info-serie kostas po DM 0,80.
- Broŝuroj de la serio Esperanto und das internationale Sprachproblem kostas po DM 1,20.
- Ĉe mendoj ni petas sendepende de la kvanto aldonon de DM 3,00 por afranko kaj sendokostoj.
- Specimenaj flugfolioj senkoste ĉe mendo de broŝuroj, alie kontraŭ DM 1,00 en poŝtmarkoj.

Pagoj

Aŭ al la konto 4563 97 - 105 (Gary Mickle) ĉe Postbank Berlin (BLZ 100 100 10 kun indiko pri la celo aŭ (pli simple) per neuzitaj poŝtmarkoj.

Mendojn

bv. direkti al G. Mickle, Brüsseler Str. 6, 13353 Berlin



Se tiu ĉi cirklo estas
~~ruĝe~~ signita, la kasisto
ĝis meze Marto 1998
ankoraŭ ne ricevis
vian kotizon por
1998.

La venontan
numeron ni
ne plu sendos.

La monto Huzi

La monto «Huzi» (Fujiyama) kaj «Sakura» (ĉerizfloroj) estas tre famaj terminoj en la mondo. La monto Huzi estas la sankta monto por la Japanoj kaj plej alta montosupro sur la japanaj insuloj. Ĝi estas belaspekta vulkana konuso, alta 3776 m. Tutmonde oni konas la bildon: En la fono neĝokovrita vulkano kaj en la antaŭaĵo florantaj ĉerizbranĉoj. La lasta vulkanerupcio okazis en 1707.

La esperantistino Hasegawa Teru (1912-1947), en Esperantio konata kiel Verda Majo, skribis ankoraŭ pri kelkaj interesaj sciindaĵoj:

Sur ĝi estas sufiĉe malvarme, kvankam ĝi staras ĉe ĉirkaŭ 35,4 gradoj je la norda latitudo. Meznombra temperaturo sur la montosupro: dum aŭgusto plus 6 gradoj laŭ Celzio; dum decembro minus 16 gradoj laŭ Celzio. Sur la montosupro la bolpunkto estas ĉirkaŭ 72 gradoj laŭ Celzio, dum sur la marnivelo ĝi estas 100 gradoj laŭ Celzio. Ĝenerale kiam neĝo degelas, ĝia kvanto fariĝas 0.1 – sed tiu de Huzi 0.8. Do jen estas la neĝo pli densa.

K. H. Kersting

Enhavo:

	paĝo
Informila sekcio en la <i>Magazino</i> (GM)	1
Atingi la redakcion retpoŝte	2
Korekto	2
La nova kapitalismo (K. H. Kersting)	3
Walter Poppeck verkis siajn rememorojn	4
Eltirajo el flugfolio de REU kaj PREM	5
NOVAĴOJ	5
Esperanto en <i>Direkte Aktion</i> (GM)	7
<i>Magazino</i> kaj dulingveco (Friedel Bues)	9
LETEROJ AL LA REDAKCIO	10
Informila sekcio: <i>Esperanto ist doch keine wirkliche Sprache, oder?</i>	11
Esperanto: neetna, senteritoria, senkultura?	15
Eŭropo sen limoj? (P. Hörz)	18
Internacia Ferio-Semajno de TANEF	21
Solvo de la krucvort-enigmo en <i>Magazino</i> 21	23
La monto Huzi (K. H. Kersting)	24